

La jidogramatiko de Zamenhof kaj lia Lingvo universala. Mallonga versio

Christer Kiselman

Enhavo

1. Enkonduko	1
2. Lingvonomoj	2
3. Fontoj	2
4. Zamenhof	3
5. La jidogramatiko de Zamenhof	4
6. La tri lingvoj de Zamenhof ... sed alia estas ankaŭ bezonata	6
7. Jido kaj Lingvo universala	8
8. Konkludoj	10
Referencoj	11

1. Enkonduko

Zamenhof verkis gramatikon pri jido ĉirkaŭ 1880. Mallonga raporto pri ĝi estis publikigita en 1909 kaj 1910 en tri numeroj de la revuo *leben un visenshaft* ‘*Vivo kaj scienco*’, sed plene ĝi aperis nur en 1982.

La gramatiko estas verkita en la rusa lingvo kaj science priskribas jidon, sed ne nur: la aŭtoro ankaŭ strebis al unuecigo de la lingvo, kiu estis parolata en multaj dialektoj. Temis pri elekto inter pluraj prononcoj kaj pri decidoj pri gramatikaj trajtoj. Tial la verko ne estas nur priskriba sed enhavas ankaŭ normigajn elementojn.

Lia gramatiko havas la titolon

Опытъ грамматики новоеврейскаго языка (жаргона)
‘Provo de gramatiko de la novjuda lingvo (la ĵargono)’.

Zamenhof studis medicinon en la Imperiestra moskva universitato dum du jaroj, de aŭgusto 1879 ĝis aŭgusto 1881, kio signifas ke, kredeble, la ellaborado almenaŭ parte okazis en Moskvo.

Li proksimume samtempe ellaboris lingvon nomatan *Lingvo universala*, kiu estas pluevoluigaĵo de lia *Lingve uniwersala* (1878) kaj antaŭiranto de *Lingvo internacia*, kiun li publikigis en Varsovio en 1887.

Ĉi tie mi prezentas parton de la enhavo de la gramatiko kaj komparas jidon kun la lingvoprojekto *Lingvo universala*. Tamen mi povas nur resumi la rezultojn, ne prezenti la lingvan materialon de la du lingvoj sur kiu baziĝas la konkludoj.

2. Lingvonomoj

La esperantlingva nomo *jido* estas listigita kiel kapvorto en vortaroj ekde 1930 kun jenaj difinoj:

PV (1930) Popola dialekto de la nuntempaj Judoj, uzata precipe en Orienteŭropo kaj Germanujo; = judgermana. Кр JUDA.

PIV (1970; 1977) Germana dialekto, miksitaj per hebreaj kaj slavaj vortoj, kiuj uzata de la orienteŭropaj judoj; = judgermana ĵargono^Z.

NPIV (2002) Germana dialekto, uzata precipe de la judoj en C kaj E Eŭropo. SIN. judgermana lingvo.

PIV 2005 (2005) kiel en NPIV (2002).

En neniu el la difinoj estas menciite ke *jido* estas lingvo. La vorto *lingvo* aperas nur en sinonimo menciita en 2002 kaj 2005.

Russian titles of Yiddish books from 1836 carry the notation *жидовский язык* and, from 1841, *еврейский язык* (Jewish language). Beginning with 1869, J. M. Lifshits introduced *новоеврейский* (Neo-Hebrew) in his dictionaries. (Max Weinreich 2008:322) ^(T)¹ Ruslingvaj titoloj de jidlingvaj libroj ekde 1836 portas la nomon *židovskij yazyk* kaj, ekde 1841, *jevrejskij yazyk* (juda lingvo). Komenciĝante je 1869 J. M. Lifshits enkondukis *novojevrejskij* (nov-hebrea (nov-juda)) en siaj vortaroj.

Kaj jen ni alvenas al la rusa nomo *новоеврейский язык*, uzata en la manuskripto de Zamenhof. Nuntempe oni plej ofte uzas *ודיש*.

En *jido* mem la nomoj de la lingvo estas *yiddish*_(n) (atestita ekde 1550) kaj (afekcie) *mame-loshn*. Vidu pliajn nomojn en sekcio 4.

En la angla oni uzas la nomojn *Yiddish*, *Judeo-German*, *Jewish German*, *Jew's German* kun iom da variaj signifoj, depende de la supozata pozicio de la okcidenta *jido* (Beider 2015:81). En la franca *yiddish*_(m) (*La culture yiddish aujourd'hui* 2004); en la germana *Jiddisch*_(n) (Aptroot & Gruschka 2010; Rosten 2013:255–269); en la pola *jidysz* (Jagodzińska red., 2012a).

3. Fontoj

3.1. Fontoj por la jidogramatiko

La fontoj por la jidogramatiko estas *З(аменгофъ)* (s.j.) publikigita fare de Adolf Holzhaus (1982). Aleksandra Kazuń publikigis prinotitan tradukon en la polan en Jagodzińska (red., 2012a).

La tri artikoloj el 1909 kaj 1910 de Dr X estas publikigitaj en Holzhaus (1982) kaj Zamenhof (1989) — eventuale nur parte; la situacio ne aspektas klara, rigardante la publikigaĵojn.

Pri la gramatiko verkis Ewa Geller (2012a; 2012b) kaj Agnieszka Jagodzińska (2012b).

¹La simbolo ^(T) indikas tradukon fare de mi.

3.2. Fontoj por Lingvo universala

La fontoj por Lingvo universala estas du leteroj de Zamenhof (1948:343–351; 351–354) kaj la libro de Gaston Waringhien (1989:23–37, 41–48), unue eldonita en 1959.

La teksto de Waringhien estas represita, komentita kaj provizita per vortlistoj en Zamenhof (1989:711–765) kaj Cash (1992).

4. Zamenhof

Zamenhof estis naskita en la jaro 1859-a en Бѣлостокъ (Bělostok’), kiu tiam apartenis al la gubernio Grodno (Гродненская губернія) en la okcidenta parto de Ruslando, kaj nun, kun la nomo Białystok, situas en orienta Pollando.

La judoj en Eŭropo vivis trilingve:

Ashkenazim had (and traditional communities still have) three Jewish languages: Hebrew (traditionally called *loshn-kóydesch*, the “language of holiness”), Aramaic (called *arámish* or *tárgum-loshn*, “translation language” from the classic translations of the Bible into Aramaic), and Yiddish (traditionally called *loshn Ashkenaz*, the “language of Ashkenaz” or *leshoynéynu* “our language” in rabbinic texts). (Katz 2004:46)

^(T) La aŝkenazoj havis (kaj tradiciaj komunumoj ankoraŭ havas) tri judajn lingvojn: la hebrean (tradicie nomatan *loshn-kóydesch*, la “lingvo de sankteco”), la aramean (nomatan *arámish* aŭ *tárgum-loshn*, “traduka lingvo” de la klasikaj tradukoj de la Biblio en la aramean), kaj jidon (tradicie nomatan *loshn Ashkenaz*, la “lingvo de Aŝkenazujo” aŭ *leshoynéynu* “nia lingvo” en rabenaj tekstoj).

Kiel jam menciite afekcia nomo de jido estas *mame-loshn* ‘patrina lingvo’.

Nomoj de judoj en Ruslando ekzistis en almenaŭ tri lingvoj: en la tutregna rusa, en la hebrea kaj en jido. Aldoniĝis poste la pola. Ili estis skribataj per tri specoj de literoj: la kirilaj, la jidaj (hebredevenaj) kaj la latinaj. Transskribado de unu lingvo al alia variis laŭ lingvoj kaj tempo kaj obligis la formojn. Tial ne estas mirinde ke aperas malsamaj indikoj, precipe pri antaŭnomoj.

La oficiale registrita nomo de Zamenhof estis Лазаръ Марковичъ Заменгофъ (Lazar’ Markovič’ Zamengof’). En la aŝkenaza hebrea lia antaŭnomo estis Elieyzer; en jido Лейзеръ (Leyzer); pli malfrue li fariĝis konata kiel L. L. Zamenhof, la kreinto, aŭ iniciatinto, de esperanto. Kiel ofte okazis tiutempe li aldonis ne-judan antaŭnomon: Ludwik.

Li loĝis kiel infano en ligna domo en *di yatkegas* ‘La strato de la viandbutikoj’; pole *Ulica Żydowska* ‘La juda strato’. Ekde 1919 la strato havas la nomon *Ulica Zamenhofska*. La domo estis malkonstruita laŭ decido en 1959 de la urba magistrato. (La informoj en tiu ĉi alineo kaj la antaŭa estas ĉefe prenitaj el Maimon 1978:17–18. Gold 1987 komentis kaj kritikis la informon pri la antaŭnomoj de Zamenhof.)

Zamenhof verkis sian gramatikon en la rusa. Pri tiu ĉi kaj pri aliaj lingvoj li skribis:

La homa lingvo estis por mi ĉiam la plej kara objekto el la mondo. Plej multe mi amis tiun lingvon, en kiu mi estis edukata, t.e. la lingvon rusan; mi lernadis ĝin kun plej granda plezuro; mi revis iam fariĝi granda rusa poeto (en la infaneco mi skribis diversajn versaĵojn kaj en la 10-a jaro de mia vivo mi skribis 5-aktan tragedion). Mi kun plezuro lernadis ankaŭ diversajn aliajn lingvojn, sed ili interesadis min ĉiam pli *teorie*

ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblon ekzerciĝadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj, sed ne per la buŝo, tial mi libere *parolas* nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane), la lingvon francan mi legas libere sed parolas ĝin *tre malmulte kaj malbone*; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ankoraŭ 8 aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie. (Letero al Michaux 1905-02-21, Zamenhof 1948:110–111)

Li “libere” parolis en la tri menciitaj lingvoj (la rusa, la pola kaj la germana) kaj tie ne mencias jidon — tamen iom pli frue en la letero li mencias ke lia popolo “parolas per aparta «ĵargono» hebrea-germana (la tiel nomata «yiddisch»).”

La postan jaron li aldonis en alia letero:

Mia gepatra lingvo estas la *rusa*; sed nun mi parolas pli pole, kaj mi nomas min ne „ruso“ sed „Rusujano“. (Letero al Th. Thorsteinsson 1906-03-08; Zamenhof 1983:523)

Li en tiu ĉi letero ne mencias jidon, kio povas esti pro prudento (ĉar lia juda identeco povus kontraŭ-efiki al la propagando por esperanto), sed la silento povus ankaŭ esti klarigita per tio ke li opiniis ke jido estas ne lingvo sed nur ĵargono. li opiniis ke jido estas ne lingvo sed nur ĵargono.² Li ja eĉ uzis tiun nomon por jido en la titolo de sia gramatiko. Sed li de plej juna aĝo parolis jidon (vidu ekz. Holzhaus 1969:19; pri jido ĝenerale en Ruslando vidu Gold 1980:303). Tial oni rajtas diri ke jido estis lia patrina lingvo; la rusa lia patra lingvo. Lia edukado en la reala gimnazio en Bjalistoko kaj en la 2-a vira gimnazio en Varsovio, same kiel en la universitatoj en Moskvo kaj Varsovio, estis en la rusa (Holzhaus 1969:70).

Kiam li estis fininta la gimnazion en Varsovio en junio de 1879, li petis permeson studi ĉe la Medicina fakultato de la Imperiestra moskva universitato (Императорский Московский университет). Ekde 1791 judoj en Ruslando rajtis loĝi nur en speciala regiono, черта осѣдлости, pli komplete черта постоянной еврейской осѣдлости ‘la regiono por konstanta juda loĝado’. Ĝi estis regiono en la sud-okcidenta parto de la rusa regno, de la Balta maro ĝis la Nigra maro, proksimume sepcent kilometrojn larĝa kaj mil kvincent kilometrojn longa. Dum la tempo de Zamenhof ĝi ampleksis i.a. grandajn partojn de la nunaj Belorusio, Litovio kaj orienta Pollando.

Zamenhof ricevis permeson studi en Moskvo. Li estis tie dum du jaroj, de aŭgusto 1879 ĝis aŭgusto 1881 (Nekrasov 1987:55–59). Li poste revenis al Varsovio kaj daŭrigis la studojn pri medicino ĉe la Imperiestra varsovia universitato (Императорский Варшавский университет), kie li finis siajn studojn en 1885 kaj fariĝis rajtigita kuracisto.

5. La jidogramatiko de Zamenhof

5.1. Kial?

Zamenhof klarigis en 1909 la motivon malantaŭ sia laboro tiel:

²Max Weinreich (2008:321) skribas ke la Maskilim en Germanujo enkondukis tiun terminon. Ĝi venas origine de la franca *jargon*_(m). Ankaŭ en la rusa oni uzis *жаргон*_(m), kiel ja faris Zamenhof mem. Birnbaum (1979:6) opinias ke ĝi estas netaŭga por la lingvo.

Inter la judoj estas multaj, kiuj ne komprenas la ĵargonon, sed ili volonte ĝin ellernus; inter la ne-judoj estas multaj, kiuj volus konatiĝi kun la lingvo de la judoj. Tamen, ĝi (s) nun al homo, kiu ne loĝas en juda medio, estus pli facile lerni la lingvon de iu afrikana gento,³ ĉar ties gramatikon li povas akiri, sed ellerni la lingvon de milionoj da kulturaj en la tuta mondo konataj judoj, estas absolute neneble! Bona gramatiko kaj konvena vortaro de ĵargono farus la lingvon, fine, atingeble facila por ĉiu lernonto. (Holzhaus 1969:23; kun iom da vario en Dr X 1989:9; jida originalo en Holzhaus 1969:29)

5.2. Kiam?

Zamenhof verkis sian gramatikon ĉirkaŭ 1880; ekzaktan tempopunkton oni ne povas indiki.

La revuo *leben un visenshaft* publikigis en la jaroj 1909 kaj 1910 informon pri la gramatiko sub la pseŭdonimo Dr X. Parto el la aperinta teksto estas represita en jido en Dr X (1969:27–34) kaj tradukita en esperanton en Dr X (1989:7–23). Sed nur malgranda peco de la gramatiko aperas tie.

En la artikoloj el 1909 kaj 1910 Zamenhof indikis ke li verkis sian gramatikon antaŭ pli ol tridek jaroj, do antaŭ 1879 (Dr X 1989:19). Poste (1989:21) li skribas ke okazis antaŭ proksimume tridek jaroj. En sia jam citita letero al Michaux li skribis:

tial mi antaŭ longatempe dediĉis ĉirkaŭ 2 jarojn al la fundamenta esplorado de tiu ĵargono, mi esploris ĉiujn ĝiajn leĝojn kaj mi ellaboris ĝian gramatikon {...}” (Letero al Michaux 1905-02-21, Zamenhof 1948:109)

En intervjuo kiun li donis en 1907 li diris: “Dum la daŭro de tri jaroj mi okupiĝis pri la jida lingvo” (Maimon 1978:164).

Josef Kohen-Cedek (1976:6) indikas la jarojn por la kreo de la verko je 1879–1882; Ewa Geller (2012a:394) je 1876–1880. Estas kredeble ke ĝi estis ellaborita almenaŭ parte dum la du jaroj kiam la aŭtoro loĝis en Moskvo.

La verko de Zamenhof estis publikigita en sia tuteco nur en 1982, pli ol jarcenton post sia ekesto, fare de Adolf Holzhaus (1892–1982). La ruslingva teksto estas tradukita en esperanton de Josef Kohen-Cedek (1904–1991), kiu ankaŭ verkis enkondukon (Kohen-Cedek 1976:3–8). La libro redaktita de Agnieszka Jagodzińska (red., 2012a) enhavas plurajn studojn pri la verkoj de Zamenhof.

La aŭtoro montras malkontenton pri la pritrakto de la teksto en *leben un visenshaft* kaj petas la redaktoron ĉesi la presadon de la manuskripto:

Pro tio, la legantoj akiras tute falsan ideon pri la karaktero kaj celo de mia juneca laboro.

Tial mi vin tre petas, sinjoro redaktoro, ĉesi presigi la eltiraĵojn el mia manuskripto ĝis mi havos la eblon eldoni ĝin entute, kun la necesaj klarigoj kaj antaŭparolo. (Dr X 1989:21)

Sed tiu tempo neniam alvenis.

³La origina vorto estas *sheyvet*_(m), tradukita per *tribo* en Dr X (1989:9).

5.3. Aliaj studoj

Kohen-Cedek (1976:5) mencias plurajn fruajn studojn de la gramatiko de jido, komencante ĉe Elijah Bakhur Levita (1468–1549), kiu verkis kelkajn aventur-romanojn en jido kaj libron en la hebrea, *Profeto Elija*, “en kiu li interalie skizis (verdire, ne metode kaj sensisteme), la regulojn de jidlingva gramatiko.” Kohen-Cedek mencias en la sekvo plurajn priskribojn de jido dum la jarcentoj.

La verko de Zamenhof estas de tute alia kalibro, pli sistema kaj ellaborita per sciencaj metodoj. Ĝi estas la unua en la rusa lingvo.

5.4. Aprezo

Lia gramatiko ne estas bone konata, nek prezata de jidistoj; Ewa Geller (2012a) eĉ nomas ĝin “Die vielfach verkaante *Jiddische Grammatik*” ‘La multrilate mistaksita *Jidogramatiko*’. Ŝi opinias ke kaŭzo de la neakcepto verŝajne estas ke ĝi pledis por tio ke la hebreaj literoj estu anstataŭigitaj per latina alfabeto kun aldono de kvar literoj kun diakritaj signoj (2012a:399). En sia germanlingva artikolo (2012a:403) ŝi nomas la latinigon “autoritär erhoben” ‘altrude levita’; en sia pollingva artikolo (2012b:31) ŝi skribas “w sposób autoritarny” ‘en maniero altruda’.

Sed ŝi opinias ke tio ne estas la sola kaŭzo: pli temis pri la opinioj de Zamenhof rilate al la “juda demando” kaj lia kompreno pri jido kiel lingvo (Geller 2012a:403).

Alia pensebla kaŭzo estas ke Zamenhof preferis ne la polan sed la litovan prononcon.

6. La tri lingvoj de Zamenhof . . . sed alia estas ankaŭ bezonata

6.1. Lingwe uniwersala

Jam kiel gimnaziano Zamenhof prezentis lingvon, kiun li nomis *Lingwe uniwersala*, kaj kiun li celebris en Varsovio 1878-12-05 laŭ la julia kalendaro kune kun i.a. Leo Wiener (1862–1939). En artikolo 1889 li skribis ke li komencis sian laboron “antaŭ 13 jaroj”, do en 1876 (Kiselman 2011:108). Sed li komencis pensi pri tiu lingvo eĉ pli frue, do jam en Bjalistoko: li skribis ankaŭ: “La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi ⟨. . .⟩ en la plej frua infaneco” (Letero al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko, Zamenhof 1948: 343).

Malmulte estas konata pri tiu lingvo; fakte ni posedas nur mallongan specimenon de ĝi.

6.2. Lingvo universala

Dum la jaro 1881 li ellaboris novan varianton de sia lingvo, nomatan *Lingvo universala*, pri kiu ni havas pli bonan scion. Tiu ĉi lingvo ekestis do samtempe, aŭ preskaŭ samtempe, kun la jidogramatiko, kaj tial povas esti interese kompari la du. Inter aliaj aferoj ni vidos ke la fonemoj (monoftongoj) estas ekzakte la samaj, kaj ke la alfabetoj estas la samaj, krom pri unu litero kiu ne ekzistas en jido.

6.3. Lingvo internacia

En la jaro 1887 Zamenhof publikigis sub la pseŭdonimo Д^р Эсперанто ‘Doktoro Esperanto’ sian libron Международный языкъ ‘Internacia lingvo’ en la rusa, kiun sekvis libroj kun la sama enhavo en la pola, la franca kaj la germana, ĉiuj aperintaj en 1887.

Dum 1888 aperis versioj en la hebrea (zamenhof 1989:124, 177; Jagodzińska 2012b: 123), en jido (Jagodzińska 2012b:124) kaj en la angla (zamenhof 1989:124, 177). Baldaŭ la lingvo fariĝis konata kiel la lingvo de Doktoro Esperanto, kaj pli poste kiel esperanto.

En Bulonjo ĉe maro la bazaj trajtoj de tiu lingvo estis fiksitaj dum la internacia kongreso de 1905.

6.4. Lingvo por la hilelistoj

En 1901 Zamenhof skribis pri alia lingvo, kreenda por la bezonoj de la hilelistoj. La lingvo de la hilelistoj ne estu esperanto, sed devas esti alia kun aliaj ecoj:

⟨...⟩ ĝi devas esti adaptita *speciale al la bezonoj de hilelistoj*. ⟨...⟩ Ĉiuj popoloj bezonas artan lingvon nur por *eksteraj* interrilatoj, hilelistoj do bezonas ĝin por *internaj* rilatoj; tial, dum nun ekzistanta lingvo Esperanto havas severe *internacian* spiriton, bazitan nur sur unu pura *logiko*, lingvo de hilelistoj devas esti adaptita speciale al spirito, vivo, pensmaniero kaj esprimoj, specifecoj kaj kutimoj de tiuj homoj, kiuj fondos unuan kontingenton de hilelistoj; sekve, krom neordinara facileco, fleksebleco, riĉeco kaj belsoneco, ĝi devas havi en si kaj stilon kaj tutan spiriton de tia speco, por ke ĉiu la plej malklera rusa-germana hebreo, lerninte dum duonhoru ĝian gramatikon, kaj dum kelkaj tagoj certan kvanton da vortoj, povu jam tuj uzi lingvon tute *libere kaj flue*, kiel sian *propran lingvon*; ⟨...⟩ (Zamenhof 1972:60; zamenhof 1990:1186; Zamenhof 2006:83)

Mi ne vidis iun specimenon de tiu mirinda lingvo. Ni povas imagi ke, kompare al Lingvo internacia, ĝi enhavos pli da vortoj rilataj al diservo kaj pli da esprimoj de sentoj. La rusa, jido kaj la pola ja posedas multe da karesvortoj.

6.5. Ĉu priskribi aŭ preskribi? Du polusoj

Galaksioj kiuj estas dek miliardojn da lumjaroj for de ni estas studataj. Al ni mankas ajna eblo influi ilin (se oni ne povas renversi la sagon de la tempo). Tio signifas ke oni priskribas fenomenon en la naturo ne influante ĝin, aŭ almenaŭ strebante al neinfluo.

Ĉu oni tiel studu ankaŭ lingvojn?

Aliflanke oni studas elektromagnetajn ondojn cele al plibonigo de la antenoj de poŝtelefonoj. Temas sekve pri fenomeno en la naturo, sed nun la studo influas la estontan teknikon kaj pere de tiu ĉi la vivkondiĉojn de homoj.

Ĉu oni kun tia celo studu ankaŭ lingvojn?

Oni daŭre malkovras novajn speciojn de insektoj kaj plantoj, kaj oni konstruadas novajn kemiaĵojn. Oni donas al ili nomojn. En lernolibroj on rekomendas aŭ malrekomendas terminojn por studataj konceptoj. Tiel oni influas la lingvon, kaj lingvistoj rekomendas aŭ malrekomendas esprimojn, ne nur en la faka lingvo sed ankaŭ en la ĉiutaga lingvouzo. Tia do estas la preskriba flanko de la aktiveco de lingvistoj.

Ĉiu prezento de gramatiko troviĝas ie inter la du ekstretoj. Eĉ gramatiko kun eksplika celo nur priskribi ne povas eviti elektojn preferantajn iujn formojn antaŭ aliaj; aliflanke, klopodo pri normigo ne povas ĉiome malatenti la faktan uzadon de studata lingvo.

Estas klare ke la gramatiko de Zamenhof montras kaj priskribajn kaj preskribajn sintenojn. Kaj ke liaj tri arte faritaj lingvoj (aŭ kvar) montras plej fortan emon priskribi. Sed evidentas ke li ne povis apriori inventi vortojn kaj gramatikaĵojn: li pruntis vortojn kaj gramatikajn funkciojn el jam ekzistantaj lingvoj.

La tuta historio pri lia jidogramatiko kaj liaj artefaritaj lingvoj pinte aktualigas la streĉon inter la du ekstretoj: inter la priskribo kaj la preskribo. Kaj mi vidas ke la streĉiteco daŭras: la nuntempaj lingvistoj ne scipovas klare kaj konscie lokigi sin inter la du polusoj.

7. Jido kaj Lingvo universala

7.1. Ĉu jido estas universala lingvo?

Ĉu la lingvo jido mem estas universala lingvo? Armin Eidherr sentis tion:

Ensuite, j'aime le yiddish comme langue idéale, comme le type même de la langue universelle: une langue qui fusionne les éléments germaniques, slaves, hébraïque, araméens, romans, ainsi que les internationalismes, une langue pour tout le monde, une langue de Juifs pratiquants, de bourgeois, de socialistes, de communistes, d'anarchistes, et j'en passe ... (Eidherr 2004:32)

^(T) Kiel sekvo mi amas jidon kiel idealan lingvon, kiel la tipon eĉ de lingvo universala: lingvo kiu fuzias la elementojn ĝermanajn, slavajn, hebreajn, arameajn, romidajn,⁴ same kiel la internaciismojn, lingvo por ĉiuj, lingvo de la judoj religie praktikantaj, de burĝoj, de socialistoj, de komunistoj, de anarkiistoj, kaj mi forlasos la ceterajn ...

Sed ekzistas kontraŭa opinio, kiun Eidherr citas de anonimulo:

Le yiddish, ce n'est pas une langue, c'est un jargon en train de mourir, sans grammaire, et pauvre, sans culture propre, un misérable dialecte de ghetto; à quoi bon s'en occuper? (Eidherr 2004:35)

^(T) Jido, ĝi ne estas lingvo, ĝi estas ĵargono survoje al la morto, sen gramatiko, kaj malriĉa, sen propra kulturo, mizera dialekto el la geto; pro kio oni sin okupu pri ĝi?

Ni rekonas la rezonadon de Zamenhof: li volis altigi sian lingvon kaj montri ke ĝi posedas gramatikajn regulojn.

7.2. Rilato inter la laboro pri jido kaj la konstruado de Lingvo universala

Mi pensas ke la rilato inter la esploroj de Zamenhof pri jido kaj lia konstrua laboro pri nova lingvo estas klarigebla per vortoj pri lia interna batalo:

(...) de mia plej frua infaneco en mi ĉiam superregadis la «*homo*», tamen pro la malfeliĉega stato de mia popolo, en mia koro ofte vekigadis la «*patrioto*», kiu terure bataladis

⁴Por doni kvantan bildon al tiu eldiro ni citu el Kahn (2015): ĝermandevena frakcio en la vortprovizo 70–85 %; ŝemiddevena 12–20 %; slavdevena 3–10 %; latinida *subtle* 'subtila', sed spuroj videblas inklude de pluraj oftegaj leksikaj elementoj (paĝoj respektive 690, 691, 696, 699).

en mia koro kontraŭ la « homo ». En la lastaj 10 jaroj la « homo » kaj « patrioto » iom post iom interpaciĝis en mia koro en formo de « Hilelismo » {...} (Letero al Michaux 1905-02-21, Zamenhof 1948:110)

7.3. Similecoj inter jido kaj Lingvo universala

Ekzistas similecoj inter jido kaj la projekto de Lingvo universala. Tute unue ambaŭ enhavas vortojn prenitajn el pluraj malsamaj lingvoj. Pri jido unu sola ekzemplo ilustration:

“rabosay, mir veln bentshn”, zagt der zeyde (Uriel Weinreich 1992:51)

Ĉi tie *rabosay* ‘Miaj sinjoroj’ venas de la hebrea; *mir* ‘ni’ estas de ĝermana origino, kvankam ĝi ne ekzistas en la nuntempa germana; *veln* (helpverbo por indiki estontecon, pluralo, unua persono) ankaŭ de ĝermana origino, sed ne ekzistas en la nuntempa norma germana; *bentshn* ‘eldiri la benon’ havas stamon *bentsh-* de jud-itala origino, venanta de la latina *benedicere* ‘beni’, kaj la infinitivan finaĵon *-n* de la germana; *zagt* ‘diras’ estas de la mezepoka germana: *saget*; *der*, difina artikolo en vira genro, same estas de la mezepoka germana kaj restas en la nuntempa germana; *zeyde* ‘avo’ venas de malnova slava formo *děd* laŭ Weinreich (1992:52).

Dum la de ni konata vortprovizo en Lingvo universala de 1878 estas nur de latina origino, Lingvo universala prenas sian vortprovizon el pluraj lingvoj, ĉefe el latino, sed ankaŭ kun vortoj de ĝermana origino (de jido, de la germana kaj en iuj okazoj de la angla) kaj slava origino (de la rusa, de la pola). Ekzistas ankaŭ vortoj el la greka kaj la hebrea.

La fakto ke jido prenis vortojn el multaj lingvoj povis esti inspiro por Zamenhof fari la saman en Lingvo universala, kontraste al la, laŭ nia scio, nur latina origino de la vortprovizo en la pli frua Lingvo universala.

Sed ni povas spekulativi pri influo ankaŭ en la mala direkto: li eksperimentis ekde sia Lingvo universala de 1878 pri konstruado de lingvoj, kaj tiu laboro certe donis al li emon iom eksperimenti pri jido kaj enkonduki normon en ĝin.

El tiu vidpunkto Lingvo universala el 1881 pli similas al jido ol la poste publikigita Lingvo internacia el 1887, kies hebredvena enhavo estas pli malgranda.

Foje estas ja malfacile scii ĉu vorto originas en jido aŭ en la germana, sed en pluraj situacioj la respondo estas klara (vidu ekzemple miajn artikolojn 1992 kaj 2008).

7.4. Memfido, malfermiteco kaj aŭdaco

Ekzistas simileco sur pli ĝenerala nivelo: Zamenhof ne hezitis proponi drastajn ŝanĝojn en la tiutempa jido. Forta memfido nepre estu en la fono, same kiel vasta malfermiteco al novaĵoj. Eble ankaŭ mankanta kompreno pri la forto de tradicioj. Eĉ pli aŭdace estis proponi tutan novan lingvon.

Kaj eĉ pli klare elstaras lia aŭdaco kiam li volas enkonduki novan religion: liajn projektojn *hilelismo* kaj *homaranismo*.⁵ Li skribis en 1901:

⁵“Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj;” la komencaj vortoj en la unua dogmo de homaranismo (Zamenhof 2006:141).

⟨...⟩ hilelistoj devas forigi el sia grupa sociordo tiujn elementojn, kiuj, ne havante en si absolute ion altspiritan kaj indan konservon, faras nur kaŭzon kaj esencon de la hebrea ekzilo.

La unua tia elemento estas

1. Kunluteco de nia religio kun nacieco kaj teritorio de ĝiaj fondintoj kaj rezultanta el tio ĉi ĝia ŝtonigitaĵo kaj eterna alforĝo nia al kadavro de longe malaperinta ŝtato kaj popolo. (Гомо Сумъ 1901:53, Zamenhof 1990:1178)

Tiaj vortoj, *ŝtonigitaĵo* (ruslingve *окаменѣлость*, *okamenĝlost'* 'fosilio') kaj *kadavro* (ruslingve *трупъ*, *trup''*), ne alproksimigis la tradiciajn kredantojn al lia religia projekto.

Por pli pri liaj pensoj pri religio vidu i.a. la komentojn de Pierre Janton en Zamenhof (1995) kaj mian artikolon (2010).

7.5. Ĉu labori por pure loka kaj provizora dialekto aŭ por universala lingvo?

Zamenhof havis du kontraŭajn sintenojn rilate al jido. Unuflanke li esprimis amon pri ĝi:

⟨...⟩ ni ĉiam rilatis kaj rilatas al ĝi eĉ nun ame kaj ni vidas en tiu ĉi tiel nomata ĵargono kaj tian saman lingvon, kiel ĉiujn aliajn lingvojn. (Гомо Сумъ 1901:11)

Aliflanke li skribis en la sama publikigaĵo:

Sed poste ni venis al la konkludo, ke tio ĉi ⟨publikigo de la gramatiko⟩ estus afero sen iu celo kaj estonteco, ke, prezentante per si mem pure lokan kaj provizoran dialekton (чисто мѣстный и временный діалектъ), ĵargono havas nenian rilaton al hebreeco kaj ke per ĝia kulturado ni alportus al hebreeco nenian komplezon. (Гомо Сумъ 1901:10–11)

Eĉ pli malbona estus la efiko de kreskanta konscio ĉe la judoj pri ilia lingvo:

Poste mi tamen forĵetis tiun ĉi laboradon, ĉar mi opiniis, ke la vekado de la kvazaŭ-nacia patriotismo ĉe la hebreej povus esti malutila por ili mem kaj por la ideo de unuiĝo de la homaro. (Letero al Michaux 1905-02-21, Zamenhof 1948:109)

Lingvo universala do servus pli altan celon ol la laboro pri jido. Li daŭrigis en 1909 aŭ 1910:

mi dubas, ĉu la ĵargono havas ian estonton kaj ĉu ĝenerale valoras, ke ni deziru al ĝi ian estonton. (Zamenhof 1989:8)

Tiaj vortoj ne povis kreskigi la respekton por liaj proponoj pri reformoj en jido.

8. Konkludoj

8.1. Pri la jidogramatiko

- La ruslingva jidogramatiko de Zamenhof, verkita proksimume en 1880, estas elstara lingvistika verko. Ĝi ne estas la unua gramatiko pri la lingvo, sed la unua verkita laŭ ankoraŭ nun validaj sciencaj metodoj. Ĝi anticipas esplorrezultojn pri la lingvo pli malfrue konfirmitajn.

- La gramatiko priskribas la lingvon tiel kiel ĝi estas — sed samtempe proponas normigon. En la tri lastaj artikoloj aperas forta admono al bona lingvouzo kaj konsiloj pri dezirinda pluevoluigo de la lingvo.

8.2. Komparo inter la jido de Zamenhof kaj la nuna jido

En la priskribo de la lingvo ni povas vidi kelkajn trajtojn kiuj ne kongruas kun la nuntempa jido:

- Diminutivoj havas laŭ la jidogramatiko la saman genron kiel la elira vorto — en la nuna ili ĝenerale estas neŭtraj.
- La verboj havas laŭ la jidogramatiko nur du aspektojn — tio ne kongruas kun nuntempaj priskriboj de la lingvo.
- Kelkaj substantivoj havas nun alian genron ol en la jidogramatiko de Zamenhof — temas pri ŝanĝo al la genro en la germana.
- Laŭ la gramatiko de Zamenhof kelkaj prepozicioj postulas akuzativon kiam temas pri almovo kontraste al la nuna lingvo, kie ĉiuj prepozicioj postulas dativon.

8.3. Komparo inter jido kaj Lingvo universala

- Jido kaj Lingvo universala, same kiel la posta Lingvo internacia, havas la samajn vokalfonemojn kaj konsonantfonemojn, kaj ankaŭ la samajn diftongojn kun unu escepto, nome [aŭ], kiu ekzistas en Lingvo universala sed ne en jido.
- La daŭro de la vokaloj estas fonologie grava en ambaŭ lingvoj.
- La alfabeto proponita de Zamenhof por jido kaj la alfabeto en kiu li verkis sian lingvon Lingvo universala estas identaj, kun nur unu escepto, la litero *ŭ* en Lingvo universala, kiu ne ekzistas en la proponita alfabeto por jido.
- Ambaŭ lingvoj enhavas vortojn kun origino en pluraj lingvoj (ne nur el latino kiel en la pli frua Lingvo universala).
- Kunfandiĝo de prepozicio kaj artikolo okazas kaj en jido kaj en Lingvo universala.
- Laŭ la gramatiko de Zamenhof kelkaj prepozicioj postulas akuzativon kiam temas pri almovo, tute simile al Lingvo universala.
- Lingvo universala prenis el jido kelkajn vortojn, kiuj malaperis en la poste publikigita Lingvo internacia.

Referencoj

- Aptroot, Marion; Gruschka, Roland. 2010. *Jiddisch. Geschichte und Kultur einer Weltsprache*. Munkeno: Verlag C. H. Beck.
- Beider, Alexander. 2015. *Origins of Yiddish Dialects*. Oksfordo: Oxford University Press.
- Cash, Rikardo. 1992. *Praesperanto. Lingvo universala*. Annecy-le-Vieux: La Kancerkliniketo.
- La culture yiddish aujourd'hui*. 2004. Actes du colloque international organisé par le musée d'Art et d'Histoire du judaïsme et la bibliothèque Medem dans les locaux du musée (Paris) les 4, 5 et 6 juin 2000. Parizo: Bibliothèque Medem.

- Dr X (pseudonimo de Л. Заменгофъ). 1989. En traduko: pri la jida gramatiko kaj reformo en la jida lingvo. **En:** *zamenhof* (1989:7–23). Traduko al esperanto de S. Guterman kun korektoj de N. Z. Maimon.
- Origine publikigita anonime en jido en *leben un visenshaft* (1909; 1910, numero 1, pp. 53–54; 7, pp. 89–96; kaj 9, pp. 97–103) sub la rubriko “vegen a yudisher gramatik un reform in der yudisher shprakh”. **En:** Holzhaus (1969:27–34) en jido kaj kun traduko al esperanto de S. Guterman (1969:20–26). (Tiu ĉi publikigaĵo enhavas nur etan parton de la gramatiko.)
- Eidherr, Armin. 2004. Le yiddish chez les non-Juifs. **En:** *La culture yiddish aujour’d’hui* (2004:31–37).
- Geller, Ewa. 2012a. Die vielfach verkannte *Jiddische Grammatik* des Ludwik Zamenhof. **En:** *Leket: yidishe shtudies haynt. Jiddistik heute. Yiddish Studies Today*, pp. 393–414. Düsseldorf: Düsseldorf University Press.
- Geller, Ewa. 2012b. Jidyszista Ludwik Zamenhof. **En:** Jagodzińska (red. 2012a:27–44).
- Gold, David L. 1980. Towards a study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto. **En:** Szerdahelyi István (red.), *Miscellanea Interlinguistica. Interlingvistikai szöveggyűjtemény – Interlingvistika Antologio – Antologia interlinguistica*, pp. 300–367. Budapeŝto: Tankönyvkiado.
- Gold, David L. 1987. N. Z. Maimon’s *La kaŝita vivo de Zamenhof*. **En:** Duc Goninaz, Michel (red.), *Studoj pri la Internacia Lingvo – Études sur la langue internationale – Studies on international Language*, pp. 40–57. Gent: AIMAV.
- Гомо Сумъ (Homo sum; pseudonimo de L. Zamenhof). 1901. *Гиллелизмъ. Проектъ рѣшенія еврейскаго вопроса* (Gillelism". Proekt" reŝeniĵa eвреjskago voproŝa). Denove publikigita en 1972 kun traduko en esperanton de Adolf Holzhaus: *Hilelismo. Projekto pri solvo de la hebrea demando*. Helsinko: Fondumo Esperanto. ISBN 951-9005-24-2.
- Grosjean-Maupin, E.; Esselin, A.; Grenkamp-Kornfeld, S.; Waringhien, G. 1930. *Plena Vortaro de Esperanto* (PV). Parizo: Centra presejo Esperantista.
- Holzhaus, Adolf. 1969. *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinko: Fondumo Esperanto.
- Holzhaus, Adolf. 1982. *Provo de gramatiko de novjuda lingvo kaj alvoko al la juda intelektularo*. Helsinko: Fondumo Esperanto.
- Jagodzińska, Agnieszka. Red. 2012a. *Ludwik Zamenhof wobec „kwestii żydowskiej”*. *Wybór źródeł*. Krakovo; Budapeŝto: Wydawnictwo Austeria.
- Jagodzińska, Agnieszka. 2012b. Doktor Esperanto i *safa berura*. **En:** Jagodzińska (red., 2012a:115–132).
- Kahn, Lily. 2015. *Yiddish*. **En:** Kahn, Lily; Rubin, Aaron D. (red.) *Handbook of Jewish Languages*. Leiden; Boston: Brill.
- Katz, Dovid. 2004. *Words on Fire: The Unfinished Story of Yiddish*. Nov-Jorko, NY: Basic Books. Dua eldono; xviii + 494 pp.
- Kiselman, Christer. 1992. Kial ni hejtas la hejmon sed ŝajnas fajfi pri la fajlado? *Literatura Foiro* **138**, 213–216.
- Kiselman, Christer. 2008. Esperanto: its origins and early history. **En:** *Prace Komisji Spraw Europejskich PAU*. Tom II, pp. 39–56. Red. Andrzej Pelczar. Krakovo: Polska Akademia Umiejętności, 79 pp.
- Kiselman, Christer. 2010. La evoluo de la pensado de Zamenhof pri religioj kaj la rolo de lingvoj. **En:** Christer Kiselman (red.), *Religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof: kultura kaj socia fono*, pp. 41–63. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio.
- Kiselman, Christer. 2011. Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof. *Esperantologio / Esperanto Studies* **5**, 79–149.
- Kiselman, Christer. 2015. La lingvoj de Zamenhof (1878, 1881, 1887, 1905). *Literatura Foiro* **277**, 260–265, 2015 oktobro.
- Kohen-Cedek, J(osef). 1976. Enkonduko. **En:** Holzhaus (1982:3–8).
- Maimon, N(aftali) Z(vi). 1978. *La kaŝita vivo de Zamenhof. Originalaj studoj*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto.

- N⟨ekraso⟩v, N⟨ikolaj⟩ V⟨ladimiroviĉ⟩. 1987. Zamenhof en Moskvo. **En:** *iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof. kromkajero 3. ludovikologiaj biografetoj*. pp. 52–62. (Unue publikigita en la nova epoko 1929, 58–68.)
- La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* ⟨NPIV⟩. 2002. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* ⟨PIV⟩. 1970; 1977. Unua eldono 1970; dua eldono per “offset” 1977. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2005* ⟨PIV 2005⟩. 2005. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- Rosten, Leo. 2013. *Jiddisch. Eine kleine Enzyklopedie*. Sesa eldono. Tradukita el la anglalingva originalo de Lutz-W. Wolff. Munkeno: Deutscher Taschenbuch Verlag.
- Waringhien, Gaston. 1989. *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj*. Dua eldono kun apendico. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio. (Unua eldono 1959, La Laguna: J. Régulo.)
- Weinreich, Max. 2008. *History of the Yiddish Language*. Volume 1. New Haven, CT; Londono: Yale University Press.
- Weinreich, Uriel. 1992. *College Yiddish. An Introduction to the Yiddish Language and to Jewish Life and Culture*. Nov-Jorko, NY: YIVO Institute for Jewish Research.
- З⟨амэнгофъ⟩, Л. (Nur la komencliteroj Л. З. aperas. La pseŭdonimo Гамзефонъ, Л. estas forstrekita.) Sen jarindiko; verkita ĉirkaŭ 1880. *Опытъ грамматики новоеврейскаго языка (жаргона)* ⟨*Provo de gramatiko de la novjuda lingvo (la ĵargono)*⟩. Manuskripto. **En:** Holzhaus (1982:9–37; la ruslingva originalo). Traduko en esperanton: *Provo de gramatiko de novjuda lingvo*, de Josef Kohen-Cedek. **En:** Holzhaus (1982:38–73). Traduko en la polan: *Zarys gramatyki języka nowożydowskiego (żargonu)*, provizita per klarigaj notoj de Aleksandra Kazuń. **En:** Jagodzińska (red. 2012a:45–110).
- Zamenhof, L.-L. 1948. *Leteroj de L.-L. Zamenhof*. Prezento de k⟨aj⟩ komentario de Prof. G⟨aston⟩ Waringhien. I. 1901–1906. Parizo: S⟨ennacieca⟩ A⟨socio⟩ T⟨utmonda⟩.
- Zamenhof, L. 1972. *Hilelismo*. Kun traduko de Adolf Holzhaus. Helsinko: Fondumo Esperanto. ISBN 951-9005-24-2.
- Zamenhof, L. 1982. Vidu З⟨амэнгофъ⟩ (s.j.).
- Zamenhof, L. L. 1983. *Originala verkaro. Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj*. Kolektitaj kaj ordigitaj de Joh⟨annes⟩ Dietterle. Osaka: Oriental-Libro. (Foto-represo de la eldono publikigita de Hirt en Lepsiko en 1929.)
- zamenhof l. l. 1989. *iom reviziita plena verkaro de l. l. zamenhof. originalaro 1. unua etapo de esperanto. 1878–1895*. Kioto: eldonejo ludovikito.
- zamenhof, l. l. 1990. *iom reviziita verkaro de l. l. zamenhof. originalaro 2. ĝis la homaranismo (1896–1906)*. Kioto: eldonejo ludovikito.
- Zamenhof, Lazare Louis. 1995. *Le hillélisme. Projet de solution de la question juive*. Tradukita el la rusa kaj el esperanto kun enkonduko kaj notoj de Pierre Janton. Clermont-Ferrand: Associations des Publications de la Faculté des Lettres et Sciences Humaines de Clermont-Ferrand.
- Zamenhof, L.-L. 2006. *Mi estas homo*. Serio Scio, volumo 6. Kaliningrado: Sezonoj.

Christer Kiselman estas homo. Pli precize li estas matematikisto kiu parolas la svedan, esperanton, la anglan kaj la francan. Li estas gastprofesoro ĉe Upsala universitato.

Li esploris pri partaj diferencaj ekvacioj, kompleksa analitiko kaj kompleksa geometrio, eĉ en spacoj de nefinia dimensio. Li gvidis dek ok personojn al doktoreco (1974–2016).

Nuntempe Christer ĉefe esploras pri digita geometrio, matematika morfologio kaj diskreta optimizado.

En la lernejo li studis la anglan, la germanan kaj la francan kaj private ekstudis la rusan je la aĝo de dek tri jaroj. Li vivis pli ol unu jaron en Usono kaj pli ol du jarojn en Francio. Sekvis pli malfrue studoj de la persa (2007–2009) kaj de la klasika greka (2010–2011) en Upsala universitato.

Por pli bone kompreni la kulturon en kiu naskiĝis la tri lingvoj de Zamenhof Christer studis dum la akademia jaro 2015/2016 jidon (kaj lingvon kaj literaturon) ĉe Lunda universitato, en du kursoj

gvidataj de Jan Schwarz kaj Delia Kübeck. En julio de 2016 li partoprenis en septaga kurso pri jido en Weimar, gvidata de Helen Beer.

Paperpoŝta adreso de la aŭtoro: Upsala universitato, Instituto por informadika teknologio,
Poŝtkesto 337, SE-751 05 Uppsala

Sukcenaj adresoj: kiselman@it.uu.se, christer@kiselman.eu

Retejo: www.cb.uu.se/~kiselman